



ESPERANTA MONATA REVUO

Oficiala organo de Hispana Societo p. p. Esperanto
kaj de la aligintaj Grupoj.

1.^a Jaro

Novembro de 1911.^a

Numero 11.^a

ENHAVO: Hispana Societo p. p. Esperanto (Alvoko).—La Turnilser-
va monahino Margerito. (Daŭrigo).—Lingvajho de la ventumilo.—Oficialaj Scii-
goj.—Ekzercaro (Daŭrigo).—La spertado.—Crónica.—Bibliografio.—Anoncoj.

HISPANA SOCIETO p. p. ESPERANTO'

GRAVA ALVOKO AL HISPANAJ SOCIETOJ KAJ GRUPOJ ESPERANTISTAJ.

Esperantista Centra Oficejo okupas sin pri la publikigado de la grava «Tutmonda Jarlibro Esperantista», kiu aperis ĉiujare de 1905^a, kun bedaŭrinda interrompo en 1911^a.

Oni intencas publikigi la aldonon de 1912^a, en Januaro de la venonta jaro per la firmo Hachette kaj K^o, de Parizo. Tiu Tutmonda Jarlibro entenos la nomaron de la grupoj kaj societoj esperantistaj ekezistantaj en la mondo; tial mi petas al la hispanaj societoj kaj grupoj, apartenantaj aŭ ne al Hispana Societo, ke ili bonvolu sendi al mi (San Juan, 48 kaj 50 Burgos), aŭ rekte al Esperantista Centra Oficejo (Rue Clichy, 51; Paris), antaŭ la 15^a de Decembro.

- 1^e. La plenan nomon de la societo aŭ grupo.
- 2^e. La adreson de la sidejo:
- 3^e. La nomojn kaj adresojn de la Prezidanto kaj Sekretario.

Kelkaj Societoj sendis al mi eksterterpe sciigojn pri ilia starigo, k. a.; kaj mi petegas, ke tiuj societoj denove bonvolu sendi tiajn sciigojn, iusiste rekomendante, ke nia oficiala korespondado estu, se eble, per poŝtkarto anstataŭ letero.

LA PREZIDANTO, M. ESTEBAN.

La Turnilserva monahino margerito

(DAHURO) (1)

II

Malsagheco kaj maliceco

La tutan tagon kaj ankoraŭ la tutan vesperon, ĝis meznokto devis Don Johano atendi por atingi la feliĉan horon de sia nova kaj tre originala entrepreno. Tio tre longo devis ŝajni al li, priokupita li pensis ĉu la monahino plenumos sian promeson, ĉu ŝi ne pentos ĉu ŝi konsiliĝos kun ia kunfidinda amikino; ĉar estas vera mirinda okazo en urbo tiel senigita de amuzajoj kaj ankati sufiĉe por kroni la famon de kuraĝa amadisto, jam tre juste akirita. Enamigi monahinon!, ĝi ne estas vulgaraĵo, tial oni komprenas, ke malpacience pasas li tiun tempon rigardante la kradan fenestron de la preĝejo, kiu lasas traŭri la taglumon de la strato en la rendevuan kapeleton.

Sed ĉion alvenas, la dekdna batis en la turhorloĝo de la monahinejo, li aplombe komvene preparita kun la glavo sub la mantelo antaŭvideante ke eble ia scivolema impertinentulo aŭ la vigla malsuperaministro intencus malhelpi; li paŝas tra la strato, apud la muro de la monahinejo, kiu projekcias ombbron; la nokto estas mezklara, ĉar la luno estas preskaŭ kaŝita de la nuboj, la tuta urbo estas tre trankvila, la plej multo el la loĝantoj estas kulturistoj aŭ pacaj laboristoj, kiuj tage laboras kaj nokte dormas; nur sonoras la vento kaj iam post iam la bojoj de la hundoj; jam la sonorilo anoncas la matepreĝon: de interno oni ekaŭdas malfortan bruon, poste la orgenon kaj unutonajn kantojn; post ĉio silentas kaj kelkaj minutoj pasis ankoraŭ, kiuj al trovadoro ŝajnis horoj: malesperita li jam abomenis pri la monahino kaj pri tuta la monaha gento, kiam en konfuza mallumo post la fera krado li ekvidis blankan konturon; mallaŭte ekkriis. — «Fratino, Dank'al Dio! pli ol unu horo mi atendis:—«Dialogo komencis inter ambaŭ en kiu la amindumanto informiĝis pri la nomo de la amindumatino, kiun unue li nomis «Filis», klarigante al ŝi, ke estas nomo atribuita de poetoj al fabela paŝtistineto kies boltalio, grandaj nigraj okuloj, blankega haŭto, estas nur komparebla al tiuj de Margerito, (tiu estis la

(1) La Redakcio presigis tiun-chi artikolon laŭ manuskripto mem ricevita de la aŭtoro; pro lia peĉo, ke oni korektu nenion.

nomo de la monaĥino,) li demandis ĉu neniam ŝi sin rigardis en spegulo, li invitis ŝin rigardiĝi denove sen tiuj monaĥaj vestoj kiuj malbeligas; de tempo al tempo Margerito demandis pri la sekreto kiu konsistis en la proksima alveno de monstroj kiuj alportas militon kaj detruon; disfalgas preĝejojn kaj monaĥejon, forrabas monaĥinojn junajn, mortigante ilin poste; li parolis al ŝi pri lokoj de plej pranda feliĉeco, de senfinaj ĝuoj, pri festenoj, pri baloj kie oni evitas la danĝerojn, kiuj minacas ŝin; li diras elmontrante sian armon, ke li volas savi ŝin.

La malfeliĉa nesperta Margerito, ebriiĝita per tiaj insidaj vortoj, akceptis volonte forkuri de ia sovaĝaj monstroj, kaj promesis alesti ree al la krado la sekvantan nokton por pli longe paroli pri la afero, ĉar fariĝis malfrue.

III

LA TENTADO

Sola en sia ĉelo, Margerito rememoris la vortojn de Dn Johano; senyestigita sin rigardis en la spegulo kaj troviĝis bela. Sekretan kaj ne kompreneblan deziron naskigis en sia koro la vaneco; la naiva monaĥino sensente ekfariĝis koketulino; ŝi antaŭ ne eksentis kiom agrabla estas plaĉi.

Margerito estis tro ĵuna kaj tro naiva, por povi kontraŭstari kontraŭ la ruzeco de lerta deloganto, kaj alpreni por juĝilo spegulon, estas ankaŭ danĝera ago.

Ŝi estis filino de nobelaj sed malnovecemaj gepatroj, hiuj sincere kredis facile kontraŭi la naturajn inkilinojn de la animo, kaj konfuzas la naivecon kaj la ignorado, kaŝante tre zorge al la idino la mondon, la plezurojn kaj la liberecon: kondamnante ŝin pro lia plej granda feliĉeco, sufoki en mallibereja domo la ĵustajn aspirojn de komencanta vivo. Oni diris al ŝi:—«Jen estas Dio»—Ŝi respondis submetiga:—«Mi amas Dion»—Oni diris:—«Jen estas la turnilo, jen estas la ĥorejo».—Ŝi eupensis—«Nenio estas pluen».—Tiel naive akceptis sian sklavecon kiel naive ankoraŭ je ses jaroj poste deziris la amon, kaj sian liberecon enpensante.

«Estas certe ke for de tiuj-ĉi muroj estas baloj kaj festenoj; estas turniroj, strangaj festoj kie kavaliroj belsintenaj disputas rekompenson por ĝin oferi al la elektita de sia koro, por kiu ili fariĝas frenezaj. Rakontoj pri kiuj mi ion aŭdis, eĉ ion legis dum mia infaneco, malgraŭ ne komprenante ilin; tiuj ne estas do iluzioj, tiuj estas do veraj. Anstataŭante per floroj kaj perloj tiujn-ĉi malbelajn kapornamojn, vere mi fariĝos multe pli bela. Tiu sinjoro diris tion al mi, kaj ne estas flato; miaj okuloj estas nigraj, blanka mia brusto, blanka mia haŭto, blanka mia ronda brako.»—Tiam, ŝi mem kisis ĝin, kaj ekkriis:—«Ho!—Mi estas bela, mi estas feliĉa!»—Tiu-ĉi floro inter miaj nigraj horoj, eĉ malbone kombitaj, kiel kontrastas, kia bonaspekto, kia bonvidiĝo; se ankoraŭ la floro estus tute nevelkita kaj la hararo pli bone arangita:—Ho!—Mi ne vole eniris tien-ĉi, miaj gepatroj surprize enmetis min en tiun karceron; la monaĥa vivado estas por mi ne tolerabla,

mi bezonas aeron, mi bezonas liberecon; ja! pardonu Dio mia, se mi ofendas vin!—Tiel esprimis ŝi, ne suspektante kiel perfida estas la intenco de la aglo kiu altiras ŝin; estas ŝi kiel birdeto kiu naskiĝis en kaĝo kaj atendas la unuan okazon. la unuan nerimarkon, ke troviĝante la pordo malfermita, ĝi forflugas por rifuĝiĝi inter la ungoj de kato. Post multaj noktoj, la lasta intervidiĝo, oni povis aŭdi le sekvantan dialogon:

D. Johano.—Jam estas tempo, precizas decidi, Margerito.

Margerito.—Morgaŭ, do.

D. Johano.—Bone, morgaŭ.—Al kia horo?

Margerito.—Al la dua.

D. Johano.—Al la dua, konforme.

Margerito.—Apud la legomejeto.

D. Johano.—Mi estos akurate, mi alportos ŝupren rampilon; al la dua, vi faros signalon.

Margerito.—Iru trankvila, ĝis morgaŭ.

Ŝi fermis la fenestron, kaj D. Johano priokupita eniris en la paternan domon, pensante pri la rimedoj, kiujn lia malsaĝa entrepreno postulas.—Unue monon; post momento, li rememoris pri malgranda kaso kie lia patro avaro gardas siajn ŝparojn; se ŝteli sian patron, ĝi estis konscienca riproĉo! —Tamen estas necesega, ĉar la kompromiso akirita estas neevitebla.

CARLOS DUQUESNAY

(Daŭrigota).

Lingvajho de la ventumilo

Ventumilo havas sian lingvaĵon, laŭ tio, se oni ĝin faldas aŭ movas.

Apogita sur nia frunto, ĝi signifas; «Atentu, oni observas nin» Sur la lipoj ĝi demandas silenton, aŭ sciigas; «Ni devas paroli» Kiam oni malfaldas tri vergetojn, ĝi diris, «Mi amas vin». Premita de la supera parto, por montri nur la vergetaron, ĝia signifo estas; «Mi ne traktas je vi», kaj tre malfaldita, «Mi malamas vin».

Por doni ciferon, oni malfaldas tiomajn vergetojn, kioma estas la semajn tago, laŭ ĝia natura ordo, esceptinte la unuan. Ekzemple: por la jaŭdo, kvara semantago, oni malfaldas kvar vergetojn; kaj se oni deziras ankaŭ esprimi la horon por ia cito, sufiĉas bati, indiferece per la ventumilo mem, la ekstremajon de unu fingro, dum tri fojoj; ĉu tiun de montrafingro, se ĝi estos vespere, ĉu tiun de maldika fingro, se ĝi estos nokte.

Kiam oni donas ventumilon, per maldekstra mano, tio signifas simpatian; kiam oni prenas ĝin per la dekstra, tio valoras neon.

Faldita kaj pendigita de la dekstra mano, la ventumilo diras; «Mi deziras fianĉon», kaj de la maldekstra, «Mi jam estas kompromitata». Apogita sur la vango, «Mi dubas pri vi»; tuŝante la hararon. «Mi rememoras vin». Kiam oni ventumilas rapide, «Mi multe amas vin», kaj se oni ĝin faldas tro

rapide, «Mi estas ĵaluza». Kiam oni faligas ĝin, «M estas via»; apogante ĝin sur la koro, «Mi amas kaj suferas».

Kalkulado de ĝiaj vergetoj, signifas, «Mi deziras paroli kun vi»; batado per ĝi, sur la manplaton, «Mi prinpensos la aferon»; trapasado de mano en manon, «Mi scias, ke vi rigardis alian virinon.»

Kiam oni premas ambaŭmane la ventnmilon, tio ekvivalas, «Amu min». Se oni ne uzas ĝin, tio volas diri, «Mi ne deziris amon»; ĝia supermeto, lume, «Vi ne plaĉas al mi».

Uzado de ventumilo ĉe balkono, volas sciigi: «Mi ne eliros»; se oni eniras hejmon, ne malfaldante ĝin, «Hodiaŭ mi ne eliros»; la troa rigardado de ĝia pejzaĝo, «Vi plaĉas al mi.» Fine, donaco de ventumilo inter geaman-tojestas signo de proksima malplaĉo.

RODRIGO BAEZA.

Oficialaj Sciigoj

Novaj anoj de nia Societo.—Numeroj, 1848. S-ro Manuel de F. Naranjo, Freixuras, 4, 1^o, 1.^a Barcelona.—1848. S-ro Cristóbal Valiente Naranjo, Cruz Verde, 26. Morón de la Frontera (Sevilla). 1849. S-ro Escolástico Alcalde Percebal. Villarroya de la Sierra (Zaragoza).—1850. Sinjorino Consuelo Domínguez, Villanueva, 6. Ronda (Málaga).—1851. S-ro José Caballero Gámez, Santo Domingo, 16. Puerto Real (Cádiz).

Oni al ili sendis Jarlibron kaj Konigan Karton.

Esperantaj Kursoj.—Okaze la Reĝa Ordono pri lernigado de Esperanto, oni klarigas Kursojn en la jenaj superaĵ kaj specialaj lernejoj Madridaj: Centra Universitato, Instituto de Sankta Isidro, Normalaj Lernejoj de Instruistoj kaj Instruistinoj, Supera Lernejo de Instruistaro, Nacia Lernejo por Idiomoj, Supera Komerca Lernejo, Madrida Ateneo, Centro de Madridaj idoj, Lernejo por Policianoj.

Nian gratulon al niaj fervoraj samideanoj.

Oni potegis ankaŭ malfermon de Kurso en la Universitato de Santiago kaj en tiu de Zaragozo; en la Institutoj de Pamplono, Teruelo, Mahono (Balearaj Insuloj), Valladolido, Zamoro, kaj en tiuj Normalaj Lernejoj de geinstruistoj.

Ghenerala Kunveno de Hispana Societo p. p. Esperanto.—Plenumante la artikolon 9an de nia Regularo, oni sciigas, ke la 16^a de Decembro okazos ĝenerala Kunveno en nia Societa sidejo (San Juan, 48 kaj 50.—BURGOS) je la oka vespere, por pritrakti la jenajn aferojn:

Situacio de la Societo.

Elektio de Prezidanto, por la dujaro 1912-13.

Oni povos ĉeesti en ĝi persone aŭ, per reprezentado, aktivaj membroj, kiuj pagis la nunan jarkotizon. Tial, estas petata de la grupoj kaj societoj, are aliĝintaj al nia, en okazo de neesto, ke ili voĉdonu per poŝtkarto, la novan Prezidanton, aŭ delegu en iu el la Burgos'aj Komitatoj.


La grupoj, kiuj rajtas elekti komitatanojn, laŭ la paragrafo 3^a de la 10^a artikolo, bonvolu sendi al la Prezidanto la nomon de la elektita membro. La Sekretario—DUQUESNAY—

Aplech Esperanta Grupo de Sabadell.—La 5an de la nuna monato, vespere, okazis grava propaganda Esperanta festo, en la Ĉefa Teatro (Teatro Principal). La grandnombra ĉeestantaro, kiu plenigis la vastan lokon, restis entuziasmigita, pro la belegaj paroladoj faritaj de Sroj Sabadell, Granpera, Solá, Oliart, Más, Molins, Pavia kaj Peig. Ankaŭ legis bonstile verkitajn poeziojn, Fraŭlinoj Bertran, Duran, Elias, Figuerola, Plana, Torra; kaj la laŭdinda pianistino, Fr. Llobet ludis tre bone muzikaĵojn. Finigis tiun ĉarman feston la Sekretario, per interesa parolado kaj poste oni kantis la Esperantan Himnon, per ĉiuj ĉeestantoj

El Villarroya de la Sierra.—Kosekvence de parolado farita de S^o Jozefo Ortigas, en la lasta kunveno de Instruistoj, li estis invitata de S^o Alvarez por pritrakti nian karan aferon en Villaluenga, kaj tial baldaŭ malfermos Kurson, almenaŭ por ĝis nun enskribitaj naŭ lernontoj. De la 3^a, en la nuna monato komencos ankaŭ en Villarroya mem nova kurso de Esperanto, kiun direktas nia nomita amiko Ortigas, kaj kiu estos speciale dediĉita por plenkreskuloj. Tiuj sukcesintaj kloplojoj de nia lerta samideano estas vere gratulindaj.

El Baracaldo.—De la 23^a, en la ĵuspasinta Oktobro, ekklarigas novan Kurson, ĉiutage, ĉe la sidejo de la tiea Grupo (San Juan, 1) de nia estimata kunlaboranto V. Echarandio, Delegito de U. E.-A. Pri tio, oni publikigis en ĵurnalo belegan artikolon, kiun subskribis la dirita samideano, kaj kiun ni tralegis plezure.

El Valencio.—La grava tica revuo, «Letras y Figuras», malfermis antaŭ longe fakon nomitan «Lingvo Esperanto», kie nia agema samideano, la infanteria leŭtenanto Nikolao Benavides, publikigas en hispana lingvo spritajn artikolojn por propagando de nia lingvo. Estus tre konvena, ke krom la esperantistaj gazetoj, en ĉiu loko kie estas esperanta grupo, la loka gazeto malfermu esperantistan fakon. En la numero de la 23^a Septembro, tiu antaŭnomita revuo rezencas la nian. Ni dankas tiun ĝentilecon.



ke la vero ĉiam venkas.—En la vin-
tro oni hejtas la fornojn.—Kiam
oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas
multajn amikojn.

13

La feino (Daŭrigo)

Kiam tiu ĉi bela knabino venis
domen ŝia patrino insultis ŝin kial
ŝi revenis (72) tiel malfrue de la
fonto. «Pardonu al mi patrino»,
diris la malfeliĉa knabino, ke mi
restis tiel longe» (73). Kaj kiam ŝi
parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el
ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri
grandaj diamantoj. «Kion mi vi-
das!» diris ŝia patrino kun grande-
ga miro. «Ŝajnas al mi, ke el ŝia
buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj!
De kio tio ĉi venas, mia flino?» (Tio
ĉi estis la unua fojo, (74) ke ŝi no-

ce, que la verdad siempre vence.—
En el invierno se encienden las es-
tufas.—Cuando se es rico (ó ricos)
se tienen muchos amigos.

13

La hada (Continuación)

Cuando esta bella muchacha vino
á casa, su madre la insultó, porque
volvía (72) tan tarde de la fuente.
«Perdóname, madre», dijo la des-
graciada muchacha, que yo perman-
ecí tan largo tiempo». (73) Y cuan-
do ella habló estas palabras, saltaron
hacia fuera de su boca tres rosas,
tres perlas y tres grandes diaman-
tes. «¡Qué veo!» dijo su madre con
grandísima admiración. «¡Parece-
me que de su boca salen de un salto
(á saltos) perlas y diamantes! ¿De
qué viene ésto hija mía?» (Esto fué
la primera vez (74) que ella la lla-

(72) Esta oración, *Kial ŝi revenis*, es causal, explicativa de la anterior, referente á los motivos por que *ŝia patrino insultis ŝin*, y se halla concebida en los mismos términos con que el sujeto de ella (*patrino*) debió expresarse, para hacer el insulto ó amonestación á la hija. Entonces, en el momento de esta acción, la de la vuelta á casa era pretérita, y por tanto el verbo, que la expresa, debe ir en este tiempo (*revenis*), que corresponde al pretérito absoluto (volvió) en Castellano. Pero es más usual en este idioma el empleo del pretérito simultáneo (*volvía*) ó del de anterioridad (*había vuelto*); y hemos preferido la primera forma por ser simple, como lo es la del original, á que nos venimos refiriendo.

(73) Es ésta una de las frases del Esperanto, para las que no existe correspondencia literal en las lenguas nacionales. En la francesa, se dice «*que je suis restée si longtemps*» y de aquí nuestra traducción «*que yo permanecí (he permanecido) tan largo tiempo*» Es que el adverbio *longe* significa especialmente largo tiempo, mucha cantidad de tiempo, y el verbo *restis*, estar continuadamente en el mismo lugar ó estado, permanecer.

(74) Con esta frase, explicativa de la anterior, y lo demuestra el estar encerrada dentro de un paréntesis, se quiere significar, no el tiempo ni la ocasión, sino el hecho, *tio ĉi*; y como éste no se especifica, se expresa en forma neutra. En cuanto al predicado *unua fojo*, limitase á afirmar que dicho hecho era el primero, en el orden de su acontecimiento

mis ŝin (75) ŝia filino). La malfeliĉa infano (76) rakontis al ŝi naivecion, kio okazis al ŝi, kaj dum ŝi parolis elfalis el ŝia buŝo multego (77) da diamantoj. «Se estas tiel», diris la patrino, mi devas tien sendi mian filinon. Maringo, rigardu, kio eliras (78) el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon (79) kaj kiam malriĉa

mó (75) su hija). La desdichada criatura (76) refirióle ingenuamente todo lo que le ocurrió á ella, y mientras ella hablaba cayeron hácia fuera de su boca una infinidad (77) de diamantes. «Si es así», dijo la madre, yo debo enviar allí á mi hija. Mariquita, mira lo que sale (78) de la boca de tu hermana, cuando ella habla; no te sería agradable tener la misma capacidad (aptitud)? Tu debes sólo ir á la fuente á sacar agua (79) y cuando una pobre mu-

ó de las veces en que se había realizado; por lo cual, el vocablo *fojo*, vez, está en nominativo.

(75) A primera vista puede parecer incorrecta la oración *Ke ŝi nomis ŝin*, si no se atiende más que á su significado temporal; pero sobre éste está el explicativo, como tenemos dicho en la Nota antecedente, y basta suplir la frase intermedia *kiam oni rimarkas*, cuando se nota ú observa, para que refiramos á este último verbo la conjunción *ke*, que, y comprendamos el exacto sentido de las palabras que le siguen. Construída así toda la expresión, será: *cuando (en que) se nota, que ella la llamó, etc.*

(76) Véase la Nota 47.

(77) El subfijo *eg* indica el más alto grado de aumento, más aún que el aumentativo ordinario *tre*: por ésto, cuando se aplica al sustantivo *multo*, le damos una significación superior á una multitud (una gran cantidad), y esta no es otra que una cantidad infinita (una infinidad), según hemos traducido.

(78) Dice el texto *Kio* en nominativo, porque es el sujeto del verbo *eliras*, y no tiene con *miru* relación alguna sino por medio del antecedente tácito *tion*, que es el verdadero complemento de este verbo. La concordancia de ambos pronombres es sólo en número, y aquí ni aun en este accidente, por ser neutros.

(79) Véase la Nota 46, párrafo 1.º. Los verbos *iri cherpi* están en relación de régimen ó dependencia, sin preposición alguna; pero, en Castellano, lleva explícita la preposición *á*, equivalente á *para*, y á la del Esperanto *por*, en el sentido de motivo ú objeto de ir á la fuente. Si en el texto no se expresa es, porque sin ella el sentido es perfectamente claro y por tanto correcta la construcción; siendo absolutamente innecesaria.

virino petos (80) de vi trinki, (81),
vi donos ĝin al ŝi ĝentile.

14

Li amas min, sed mi lin ne amas.
—Mi volis lin bati, sed li forkuris
de mi.—Diru al mi vian nomon.—
Ne skr.bu al mi tiajn longajn (82)
leterojn.—Venu al mi hodiaŭ ves-
pere (83).—Mi rakontos al vi histo-
riou.—Ĉu vi diros al mi la veron?—
—La domo apartenas al li.—Li es-
tas lia mia onklo, ĉar mia patro es-
tas lia frato.—Sinjoro Petro kaj lia
edzino tre amas miajn infanojn; mi

ĵer te pida (80) do beber, (81) tu le
darás ésto cortésmente.

14

El me ama, pero yo no le amo.—
Yo quise pegarle, pero él se alejó
corriendo de mí.—Díme tu nombre.
—No me escribas tan largas (82)
cartas.—Ven á mi esta tarde (83).
—Yo te referiré una historia.—¿Tú
me dirás la verdad? La casa le per-
tenece.—El es mi tío, porque mi
padre es su hermano.—Señor Pedro
y su esposa aman (quieren) mucho
á mis niños; yo también amo mu-
cho á los suyos (niños).—Muestra-

(80).—La sustitución del futuro simple del Esperanto por el presente de infinitivo en Castellano es muy usual; pues, en rigor, ambos envuelven una idea futura, siendo más lógico y más claro el primero, que se refiere al tiempo, sin idea alguna de condición ni subordinación.

(81).—En esta frase se observan dos variantes: 1.^a El empleo de la preposición *de*, en Esperanto, traducida por *á* en Castellano. 2.^a Esa misma preposición, en sentido partitivo, usada por nuestro idioma nacional; de la que aquél ha prescindido. Lo primero obedece á la costumbre; siendo más lógico decir *de ti* que *á ti*, cuando indica procedencia, no dirección. En cuanto á lo segundo, véanse las notas 46 y 79.

(82).—En rigor, debiéramos traducir *tiajn longajn* por *tales largas*; ya que el vocablo *tia* indica cualidad ó especie, no cantidad ni modo: pero en Castellano el término *tan*, por apócope de *tanto*—*a*, se usa también como calificación, no como adverbio: así decimos. ¡*Pedro es tan bueno!*, ¡*Te quiero tanto!*, etc.

(83).—Es en Esperanto una frase corriente, decir *hodiaŭ vespere*, como en Castellano se dice *esta tarde*, y también podría decirse, más lógicamente, *hoy por la tarde*; es decir, en la tarde de hoy. Diríamos *tiu ĉi vespero*, cuando nos refiriésemos á una tarde, que quisiéramos determinar ó señalar entre otras, sin indicar la idea del día á que la tarde pertenece. Así, para expresar que esta tarde es larga y aquella corta, diremos *tiu ĉi vespero estas longa, kaj tiu mallonga*; pero para decir que iré á esa esta tarde, deberé traducir, *mi iros tien la hodiaŭan vesperon*, ó mejor *hodiaŭ vespere* (la tarde de hoy, ú hoy por la tarde). Lo mismo se dice *la hieraŭan vesperon*, ó *hieraŭ vespere* (la tarde de ayer ó ayer por la tarde) y *la morgaŭan vesperon*, ó *morgaŭ vespere* (la tarde de mañana ó mañana por la tarde), etc.

ankaŭ tre amasiliajn (infanonjn).— Montru al li vian novan veston.— Mi amas min men, (84) vi amas vin men, li amas sin men, kaj ĉiu homo amas sin men.— Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin men.— Mi zorgas pri (85) mi mem, sed ŝi men tute ne zorgas pri ŝi kaj tute sin ne gardas.— Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la verper-mango miaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo (86).— Mi jam havas mian ĉapelon: nun serĉu vi vian.— Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.— La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas lia pupo, (87)— Oni ne forgesas facile sian (88) unuan amon.

les tu nuevo vestido.— Yo me amo á mi mismo, (84) tu te amas á tí mismo, y cada (todo) hombre se ama á sí mismo.— Mi hermano dijo á Esteban, que le ama más que á sí mismo.— Yo cuido de ella así como cuido de mí mismo; (85) pero ella misma no se cuida de sí y no se guarda totalmente (por completo).— Mis hermanos tienen hoy huéspedes; después de la comida nuestros hermanos salieron con los huéspedes de su casa (de la de nuestros hermanos) y les acompañaron hasta la casa de ellos (86).— Yo ya tengo mi sombrero: ahora buscad el suyo (de ustedes).— Yo me lavé en mi habitación, y ella se lavó en su habitación.— El niño buscó su muñeca; yo enseñé al niño, dónde está tendida (yace) su muñeca (87).— No se olvida fácilmente su (88) primer amor.

(84).— En esta frase, como en las análogas siguientes, usamos en Castellano de los dativos pasionales monosilábicos *me, te, se*, y del pleonástico *mismo*. En Esperanto, aquellos dativos no se traducen, y el pronombre personal, en su oficio de complemento directo del verbo, no tiene más alcance que cualquiera otro término, según es lógico.

(85).— Véase la Nota 13.— La preposición esperanta *pri*, significa respecto de, concerniente á cualquier asunto; y la castellana *de*, además de los sentidos que hemos visto en la Nota 18, expresa el asunto de que se trata, y equivale á *sobre*.

(86).— Este ejemplo es referente al empleo del posesivo *sia*. Véase la Nota 26.

(87).— Se dice *ghia pupo*, refiriéndose á la muñeca del niño, porque, según el mismo Dr. Zamenhof, el Esperanto acepta la costumbre inglesa de asimilar los niños, animales y cosas, para el empleo del pronombre *ghi*, sin que aquella ni esta lengua rebajen, en modo alguno, la dignidad de los niños. Las palabras, dice, tienen un sentido natural; y como aquí no se determina el sexo del niño, se usa el pronombre asexual correspondiente. Si conociéramos al niño y supiéramos que no es del sexo femenino, le diríamos *li*, según sabemos para todos los nombres masculinos de persona.

(88).— El pronombre reflexivo *sia*, se refiere aquí ó *oni*, que es el sujeto de la oración y de tercera persona. (Véase la Nota 38). Dicho pro-

LA SPERTADO

(PRESKAŬ FILOSOFIA RAKONTO)

S^o Tomaso Barientos estis saĝa kaj singardema persono. Neniam, li ekdecidis fari ion, ne pripensante ĝindum longa tempo, kaj ne antaŭpesante la profitojn kaj malprofitojn, per ĝusta pesilo.

Ne; trorapidaga viro ne estis S^o Tomaso. Kaj li fidis nek pri sia prudento, nek pri siaj naturaj impulsoj, nek pri sia instinkto; ĉar li pesis kaj mezuris la aferojn, kontrastante ilin per propra kaj malpropra spertado.

Al la spertado oferis S^o Tomaso Barientos respoktan kulton.

En la estinto, li diris, estas skribita la estonto, kaj tie devis serĉi ĉiu viro la regulojn por sia konduto.

La apriori rezono estis trompa, nur propra de sensubstancaj idealistoj kaj de malnovaj metafizikaj jarentoj.

Kaj tiel li ĉiam, kiam li devis ekdecidi gravajn aferojn, serĉis, en sia memoro aŭ en la notoj de sia taglibro, iun analogian okazintaĵon; kaj per ĝi li havis instruado kaj pro tiu instruado li decidis plenumi tiajn aŭ aliajn agojn.

Sed, ĉar la diablo estas sagaca kaj ŝatas turmenti la singardeman viron, la spertado ofte liveris mokojn al S^o Tomaso Barientos.

Jen, ekzemploj:

Alvenis la 15^a de Oktobro, kaj la gazeto sciigis al li ke la antaŭan 15an de Oktobro oni sentis malvarmon kaj ke, pro tio ke li ne surportis vintran vestaĵaron, li suferis teruran kataron, kiu preskaŭ estis kvazaŭ pulma malsano.

Sekve, kvankam la termometro markis la 18^o je la ombro kaj iom pli je la suno, S^o Tomaso vestigis per vintra vestaĵaro, pro kio li ŝvitis troe, kaj li ankaŭ katarumis.

Sed li ne perdis, pro tio, konfidon pri la spertado; ĉar li rimarkis ke la antaŭa jaro estis supera kaj la nuna ne estas tia; kaj li korektis tiel la spertadan regulon: en la superjaroj oni devas survesti vintran vestaĵaron, de la 15^a de Oktobro; kiam ili ne estas superjaroj, oni devigas konsiliĝi kun la termometro.

En la morala ordo li ankaŭ suferis eltrompojn. Li pruntedonis al amiko 600 Sm, ne ricevante kvitancon, kaj la amiko tion neis al li.

El kio li deduktis tiun eksperimentan regulon: oni devas prunti nenion al la amikoj, ne ricevante la decan kvitancon.

Sed iam akompauis lin ĝis la pordo de lia hejmo alia amiko el la plej intimaj, kaj ĉar en tiu momento ekpluvis, la amiko petis de li la pluvombrelon. Kaj S^o Tomaso, rememorante la regulon kiun li sin trudis, donis al li la pluvombrelon, jes, sed postulis de li ke li supreniru kaj kvitancon pri ĝi. Tamen, estas tre ofendiĝema gento kaj la amiko ofendiĝis vere, ĵetis la pluvombrelon sur lian kapon, nomis lin malsprita kaj turnis al li la dorson.

S^o Tomaso skribis en sia taglibro: Kvankam ĉiam estas risko, la pluv-

ombrelon oni povas pruntedoni al la intimaj amikoj, ne bezonante kvintancon.

Trairis la Sanktan-Jeroniman straton, en somera vespero, nia S^o Tomaso, komprenoble lia vizaĝo al la suno, kaj je kontraŭa direkto venis belega sinjorino. Li ektuŝis ŝin, kiu estis agrabla ektuŝo, kaj li senkulpigis sin ĝentile, dirante: «Pardonu min, sinjorino, mi iris miregigita, kaj tio estas komprenbla, ĉar mi iris kun la vizaĝo al la suno»; kaj li kunigis la ĝentilajn kun ĉarma sinteno, montranta klare, «la suno estas vi.»

La sinjorino rezultis esti tre afabla, etendis al li la manon, ridetante, kaj ili amikiĝis unu la alian.

S^o Tomaso skribis en sia taglibro. «En la someraj vesperoj oni devas trairi la Sanktan-Jeroniman straton kun la la vizaĝo turnita al la suno, kaj oni devas ektuŝi kun ĉiuj belaj sinjorinoj».

Sed, la sekvantan jaron, ĉe la sama epoko, li volis apliki la formulon; li ektuŝis kun alia sinjorino intence, li ripetis la ĝentilan formulon, kaj ne atendente ĝis kiam kiam ŝi etendos al li la manon, li faris sintenon por ĝin preni al ŝi, sed li sentis ke alia timeginda mano batis liajn vangojn, farante ke li vidu samtempe la malleviĝantan sunon kaj stelaran ŝprucakvaĵon.

Estis necese ŝanĝi la rezultaton de la antaŭa sperto, aldonante: «Sed konvenas antaŭ ĉio elserĉi ĉu la sinjorino kun kiu oni devas ektuŝi iras sola».

Kaj tiamaniere sin iris teksanta la vivo de S^o Tomaso; kaj malgraŭ ke li alĝustigis sian konduton al la instruado de la sperto, pluvis sur li konfliktoj, malfeliĉaĵoj, kaj eltrompigoj.

Je kio konsistas, li demandis sin mem, tiuj mo koj kiujn la spertado donaci? al miŝ Ĉu ne certigas la popola proverbo ke la espartado estas patri-no de la scienco? Kiel por mi sola la amemeganta patri-no interŝanĝas per kruela duonpatri-no?

Malgraŭ ĉio, S^o Tomaso Bariantos daŭrigis aplikante al sia konduto la pozitivistan metodon.

Kaj daŭris oftigante la eksperimentaj konfliktoj kaj la praktikaj vangfrapoj.

Decide, je io konsistis lia malfeliĉeco; sed je kio ĝi konsistis?

Fine, ian matenon, en kiu por amuzi per io li tra legis germanan libron de fabloj, li trovis en unu el ili la ŝlosilon de la problemo.

La fablo, substance estas jene: En Aŭgusta vespero, tra malebena kampo, inter senfruktaj montdeklivoj kaj sub varmega suno, vojiris azeno ŝarĝita per sakoj da salo. La ŝarĝo estis grandega por la malfeliĉa azeno, kiu vojiris spireganta kaj ŝvitanta.

La sakoj estis malnovaj, kun malbone kudritaj flikoj kaj truoj kaj ŝiraĵoj, tra kiuj la salo eliras, falante sur la postaĵo kaj la kolo de la kompantinda besto.

(Daurigota).

CRÓNICA

Brasil.—El Coronel Portilho, Inspector de la 6.º Región militar, y uno de los socios más antiguos de *Brazila Klubo* de Rio Janeiro visitó en Para los cursos preparados por la «Societo Esperantista» Dro Baena», en el Instituto Cívico-Militar Paes de Carvalho y el curso de Unión Española, donde fué recibido por toda la Junta Directiva. En la escuela «Ma Citología» en Pernambuco, dirigida por don Manuel Feodrippo de Souza, se han abierto cursos de Esperanto. La revista *A Bandeira* en Bahía, publica un curso de Esperanto é informes referentes á nuestro movimiento. También se dan nuevos cursos en el «Lyceo de Artes é Officios» de Rio de Janeiro, en «Pedagogium» y otros centros de enseñanza.

Cuba.—Para dar á conocer al mundo la importancia de esta Isla y destruir los perjudiciales prejuicios que aún existen acerca de ella, D. Antonio Alemán Ruiz, presidente de la «S. K. P. E.,» ha pretendido fundar una revista Esperantista, que sería enviada gratis; pero por dificultades materiales insuperables, las correspondientes noticias serán enviadas á diversas revistas extranjeras, usando para ello del Esperanto.

Francia.—La *Section Commerciale et Industrielle* del Grupo Esperantista de París ha organizado una fiesta de propaganda con motivo de la reapertura de los cursos comerciales de Esperanto. Esta fiesta presidida por M. Girardin, Maire del X.º y numerosas personalidades han tenido ocasión de manifestar sus simpatías para la causa del Esperanto enviando felicitaciones al Presidente de la Sección, D. Decaen, entre otras, el Senador Lucien Cornet, los señores Diputados Justín, Cadart, Fernando Boisson, Groussier y otros, del Grupo parlamentario esperantista, del que M. Justín Godart es presidente.

Dicha fiesta ha revestido gran solemnidad y alcanzado extraordinario éxito para nuestro movimiento en Francia.

La Sociedad francesa para la propaganda del Esperanto ha emitido el siguiente voto acerca de la proposición de la Federación Esperantista de la Región Parisiën: «El Comité de la Sociedad francesa para la propaganda del Esperanto, invita á todos los Esperantistas franceses á adherirse á las Sociedades que tienen por objeto la propagación ó la defensa de la lengua francesa, especificando bien su cualidad de miembros de las agrupaciones esperantistas. Así probarán, á los que duden todavía, que luchando por la adopción del Esperanto, trabajarán en una obra que, de ningún modo, está en oposición con la de aquellas Sociedades.»

Japón.—El Conde Hayashi, antiguo Ministro de Negocios extranjeros en el Japón, ha sido elegido presidente de la Asociación Esperantista Japonesa.

Samos. —Después de la publicación de la Circular del 22 de Junio, que ya conocen nuestros lectores, el presidente de la Samosa Esperantista Socio, ha dado una serie de lecciones, en Karlovassi, á los profesores que acudieron para prestar el examen de capacidad. Tuvo lugar este curso, en el gran salón de la escuela «Porfirias», y adquirieron el «Atesto pri lernado», trece profesores.

Suiza. —El día 10 de Septiembre último, los Esperantistas suizos tuvieron su junta general, en Biel (Bienne). En los exámenes que se verificaron, adquirieron diplomas seis candidatos. El presidente M. R. de Sanssure, que durante cuatro años ha venido rigiéndola, fué nombrado, por aclamación, socio de honor, y sustituido, á sus instancias, por Ed. Stettler, de Rern, Vice-director de M. E-A. El número de la Comisión central ha aumentado, hasta 11 miembros, de 6 que eran en la mencionada fecha.

Turquía. —En Van se ha fundado, bajo la dirección del Sr. Ervand Ter-Mkrtejan, un grupo esperantista, donde se estudia nuestra lengua, por medio de la lengua armenia.

BIBLIOGRAFIO

Cuerpo nacional de Ingenieros de Montes. Inspección de Repoblaciones Forestales y Piscícolas. Clasificación bibliográfica decimal y extracto de las tablas de Montes; por Ricardo Codorniu, Ingeniero de Montes. —Malgraŭ ke tiu-ĉi bela verketo nur povas interesi precipe la arbaristojn kaj estas verkita en hispana lingvo, ni aŭnceas ĝin on nia rovujo, certaj ke la publiko tion tre ŝatos dank' al la konsidero, kiun oni ŝuldas al la grandaj moritoj de nia kara amiko kaj kunlaboranto, S^o Codorniu, tiel fervora apostolo por la vivo de Esperanto, kiel por la ekzisto de la arboj, kiujn la sendanka homaro ne multe amas kaj flegas en kelkaj okazoj, speciale en nia patrujo.

Ŝajnas al ni superflue paroli pri la boneco de la verko, ĉar ĉiuj konas la apartan lertecon de S^o Codorniu, kiel inĝeniero, kaj se li sprite diras intersiaj, intimaj amikoj, ke al la Esperantistoj li sin prezentas kiel arbaristoj, kaj al la arbaristoj kiel Esperantiston, ni tamen kredas-kaj lia modesteco pardonu tiun ĉi mian deklaron-, ke la Esperantistoj kaj arbaristoj estas tre konvinkitaj pri lia eksterordinara kompetenteco en ambaŭ fakoj.

Turismo. Che la fervojo de Paris al Orleans. Tureno. Bretanio. Auvernio. Pirineoj. Geografaj kartoj, ellaboritaj de la firmo Bion-Douton. —La eldonisto de tiu ĉi luksa broŝuro, S^o J. Barreau, 16, Rue Littré, Paris, povas fierigi pri sia verko, ĉar malfacile oni trovos pli interesan albumon, kun belegaj ilustraĵoj, kaj klaraj kartoj. La informoj estas tre utilaj por la turistoj, kaj se la broŝuro atingis tre grandan sukceson ĉe la publiko, ĝi estas tre meritita, kaj ni ne povus sufiĉe gratuli la Kompauion fervojan de Orleans, kiu havis tian laŭdindan iniciaton.

Ĉiuj Esperantistoj dizirantaj ricevi *sempage* kaj *afrankitan* tiun-ĉi belegan albumon, bonvolu peti ĝin al la fervoja Kompanio de Orleans (Bureau du Trafic-Voyageurs-Publicité, 1, Place Valhubert; Paris).

La Gildhala pro-paca kunveno en Londono (Komenco de nova epoko).—Prezo: 1 penco. Che la British Esperanto Association, Museum Station Buildings 133-136. High Holborn. London. W. C.—Tre grava, 23-paĝa kaj bele eldonita broŝuro, kiu certe tre interesos la Esperantistojn. Ĝi enhavas la parolojn de la Lord Mayor (Ĉefurbestro) de Londono, de S^o Balfour (Eks-Ĉefministro) kaj de aliaj eminentuloj, kun aldono de pro-pacaj paroloj de S-roj Edward Grey (Brita Ĉefministro de Alilandaj Aferoj), Andreu Carnegie kaj lotero de Lia Reĝa Moŝto Georgo V^a.

Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizajhoj de Esperanto, por Esperantaj ekzamenoj. Verkis, R de Ladevehze. 1011^a. Friedrich Ader, Esperanto Verlag. Dresden. A.—S^o Ledevéze faris grandan servon al nia afero per tiu-ĉi verketo, en kiu, en korekta stilo, li amasigis ĉiujn informojn pri Esperanto laŭ instrua vidpunkto kaj eltiritaĵn el la plej certaj oficialaj fontoj. Tiu ĉi verketo estos de granda kaj necesega helpo por ĉiuj Esperantistoj dezirantaj sin prepari por la Esperantaj ekzamenoj kaj por la Profesoroj mem. La libreto dividiĝas en sep partoj: 1.^o Debena kaj elekto de la lingvo.—2.^o Historio de la lingvo.—3.^o Deklaracio pri Esperantismo. Kongresoj.—4.^o Lingvaj kaj ne lingvaj organizajhoj.—5.^o Gazetaro.—6.^o Literaturo.—kaj 7.^o Nuna stato de la movado kaj interna ideo de Esperantismo, laŭ paroladoj de D-ro Zamenhof en Genovo (1906) kaj Kembrigo (1907).

Esperanta Kalendaro por 1912^a, kun enkoduka Kurso de Esperanto, en germana lingvo.—Central-Verlag für Esperanto und Stenographie. Eldonejo de «Germana Esperanto Gazeto», Magdeburg, Kaiser Friedirchstrasse 1.—Jen zorgo presita kaj aranĝita verko, kiu prezentas, krom facila kurso por komencantoj, bonegan pliperfektigan materialon per anekdotoj, poemoj, rakontoj, kaj paroladoj de nia majstro ĉiam malgrandan pecon ĉiutage, kiun la posedanto de la kalendaro facile trastudos, fariĝinte per tio sen penado perfekta esperantisto en la daŭro de nur unu jaro. Ĝia prezo estas nur, kun mapo por poste bindigi ĉiujn foliojn, kaj tiel fari fortan volumon de 366 paĝoj, 1,250 Sm, sendita ĉien afrankite, de la nomita eldonejo.

V. INGLADA.

Nuestro estimado *samideano* D. Fernando Soler Valls, autor de «*El Esperanto al alcance de todos*», que publicó en 1909, nos ruega hagamos constar, que la obrita anunciada *con este mismo título*, en esta sección de nuestro número anterior, cuyo autor es D. Julio Mangada, capitán de Infantería, ha sido publicada sin permiso ni conocimiento alguno del Sr. Soler. Resulta, por lo tanto, ilegal el uso de dicho título puesto por el Sr. Mangada á su librito, siendo muy de lamentar que este señor haya dado motivo para un litigio en asunto de tan pura idealidad, como éste de la propaganda del

Esperanto, por lo cual, de hoy en adelante, los autores de obras esperantistas tendrán que valerse de la tan conocida y tan poco moralizadora advertencia comercial: «¡Cuidado con las imitaciones!»

Queda complacido nuestro comunicante.

✻ ✻ ✻ ✻ ANONCOJ ✻ ✻ ✻ ✻

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912

ABONO AL LA GAZETO

“La Ondo de Esperanto”

(laŭ la adreso: **Moskvo**, Rusujo, Tverskaja, 26).

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado «La Ondo» **senpage** donos al siaj abonantoj, **krom 12 n-roj** (10—20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de s-ino M. Ŝidiovskaja ĉefverkon de rusa literaturo:

“**Princo Serebrjanij**” de **TOLSTOJ**

(352-paĝa, grandformata libreĝo, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60).

Literat, konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konatoj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fak. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr).

La abonpagon (**2 rubl.=2,120 Sm.**) oni sendu «Librejo Esperanto» (**26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo**) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

ESPERANTISTA POŝKALENDARO

POR LA JARO 1912

ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL

Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19

KAJ KORESPONDANTOJ

Presejo “La Unión”.-Placo Fernández Fontecha, num.4.-Cádiz.